

Kulturaj Kajeroj

DUMONATA INFORMADA KAJ KULTURA REVUO

Direktoro : P. BABIN, prezidanto de la Kulturdomo de Franclandaj Esperantistoj, 44 - NANTES, Francujo

JARABONO :

Simpla : 10 fkoj
Bonfara : 15 fkoj

P. BABIN
13, boulevard de la Chauvinière
44 - Nantes
P.Ĉ.K Nantes : 2.813.61

(Vidu la liston de niaj perantoj sur paĝo 4)

NOVEMBRO - DECEMBRO

1971 6

KULTURAJ KAJEROJ

1971 NOVEMBRO - DECEMBRO

Dumonata informada kaj kultura revuo

REDAKCIA KOMITATO :

Sekretario :

P. Babin, 13, boulevard de la Chauvinière
44 - Nantes

Komitatanoj :

Paul Guillot
Frédéric Thébaud
Pierre Chevalier

La represo de artikolo el nia revuo estas permesita post interkonsento, kun la redakcio. Oni bonvolu ĉiam citi la nomon « Kulturaj Kajeroj » kaj sendi ekzempleron de la revuo aŭ gazeto en kiu aperis la koncerna represaĵo.

ENHAVO

El Grésillon

Esperanto tra la mondo A. Frangeul

Eksterordinara Savado

Ĉielarka Mondo

La granda piramido (fino) E. Motillon

Ĉu instinkto — Ĉu inteligenteco, ĉe la bestoj ? P. Métivier

Klarvido ? Antaŭsento ? Hazardo ? A. Kalpay

Museto en la ŝranko S. Mrozek

La maljuna brigadestro P. Stojanov

Nia konkurso P. Chevalier

KULTURAJ KAJEROJ
ne similas, ne similos al aliaj Revuoj.

KULTURAJ KAJEROJ
spegulos la vivon de nia Esperantista Kulturdomo.

KULTURAJ KAJEROJ
publikigos la plej gravajn prelegojn aŭditajn de niaj vizitintoj, kaj artikolojn de diverslandaj eminentaj esperantistoj.

KULTURAJ KAJEROJ
respondos al gramatikaj demandoj.

KULTURAJ KAJEROJ
prezentos konkursojn, kaj diversajn amuzaĵojn.

Ni deziras ke « **Kulturaj Kajeroj** » plaĉu al vi. Sendu viajn sugestojn, kaj kritikojn

La Esperantista Kulturdomo kaj Kulturaj Kajeroj deziras al siaj amikoj agrablajn krisnaskajn tagojn kaj sendas al ili sian plej koran novjaran saluton.

El Grésillon

GRESILLON 20-jara

En julio 1952 Grésillon malfermis siajn pordojn kaj Henri Micard realigis sian revon. De tiu tempo pli ol 8 000 gesamideanoj vizitis la kastelon. Tiuj malpravis, kiuj ĉe la komenco dubis pri la vivebleco de la Esperantista Kulturdomo. Kiam la celo estas preciza, grupo da bonvolemaj homoj kapablas ĝin atingi eĉ kiam ekstaras neatenditaj obstakloj.

La estraro de EKD pensis, ke estus bone fari bilancon de tiuj 20 jaroj ne nur sine de la konsilio sed ankaŭ publike okaze de la diversaj somerperiodoj .Unu tago dum ĉiu periodo estos dediĉita al speciala celebrado. Sed la estrato pensis, ke ankaŭ povus esti okazo por la ĉefaj internaciaj esperantistaj organizoj sendi reprezentanton. Pro tio ni invitis ilin sendi respondeculon dum la dua periodo (23/7 - 6/8), kiu parolos pri la agado de sia Asocio, prezentos celojn, atingaĵojn kaj esperojn. Ni estas certaj, ke la ĉeestantoj, kiuj konas nur la organizojn al kiuj ili aliĝis, povos pli bone, pli profunde koni ilin, kaj ankaŭ ekkonos la aliajn. Ni esperas, ke nia alvoko ricevos favoron.

Tiu 20-jara datreveno ŝajnis taŭga dato por provi realigi ideon, kiu jam de pluraj jaroj kuŝas en la dosiero « realigotaĵoj ». La kastelo estas vera paradizo por la infanoj. Ni deziras, ke ĝi fariĝu la paradizo de la esperantistaj infanoj, dum du semajnoj en julio (9-23). Ni esperas ke geknaboj 6-12 jaraj venos el pluraj landoj por lerni aŭ praktiki esperanton tute aparte de la plenkreskuloj, kun speciala programo adaptita al ili.

Do ni atendas vin, multnombrajn ? Vi scias, ke por eviti malagrablan surprizon vi devas tre rapide aliĝi. Tuj petu informojn kaj programon.

Esperanto tra la Mondo ★

LA UNIVERSALA KONGRESO 1972 EN PORTLAND (USONO)

— Por tiu kongreso kiu okazos de la 29a de Julio ĝis la 5a de Aŭgusto, U.E.A. aranĝos aviadilan karavanon, kiu foriros el Amsterdamo, la 26an de Julio kaj revenos la 18an de Aŭgusto, ĉu el Portland, ĉu el San Francisco se la plimulto deziras partopreni la tiean postkongreson. La partoprenantoj devos esti individuaj membroj de U.E.A. Skribu urĝe al F-ino M.-H. Vermaas komisiito de U.E.A., Nieuwe Binnenweg 70 II R, Rotterdam - 3002, Nederlando.

— La postkongreso en San Francisco okazos de la 6a ĝis la 13a de Aŭgusto.

— La kongreso de Portland havos kiel kongresejon. hotelon Hilton kie restados la kongresanoj. Tre interesaj ekskursoj prepariĝas.

— Survoje al Portland (por la individuaj vojaĝantoj), la kanadaj esperantistoj invitas al la Kanada kongreso de Esperanto, en Victoria (24-26 de Julio). Informoj : K.K. de Esperanto, 1712 Haultain St. Victoria, B.C. Kanado.

— Kiel kutime, la konstanta adreso por la kongreso de Portland estas en la sidejo de U.E.A., Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam - 3002, Nederlando.

— La ĉeesto de pluraj centoj da esperantistoj el pli ol 30 landoj estas jam certigita.

SOMERAJ UNIVERSITATAJ KURSOJ EN LIEĜO

Oni antaŭvidas somerajn universitatajn kursojn en la modernega kvartalo Sart Tilman de la Universitato de Lieĝo, Belgio, de la 30a de Julio ĝis la 27a de Aŭgusto. La studprogramo ampleksos du sekciojn : lingvistiko kaj medicinaj sciencoj, kun eminentaj esperantistoj.

La antaŭvidata tuta elspezo entenos bazan kotizon de 1200 belgaj frankoj kaj la restadkotizo. Tiu lasta estas ĉiusemajne, 1800 belgaj frankoj.

Kondiĉoj de partopreno : 1) Abiturienteco (aŭ similnivela klereco) ; 2) Minimuma aĝo : 17 jaroj ; maksimuma : 40 jaroj.

Adreso : S-ro André Heck, Someraj Universitataj Kursoj, Boîte Postale 9, B-4000 Liège 3, Belgio.

ALIAJ MANIFESTACIOJ KAJ RENKONTOJ

— Junulara renkontiĝo en Kulturdomo Esperantista, Kastelo Grésillon, 49 - Baugé, Francio, 3-9a de Aprilo ; ĉeftemo : « Kien evoluas la mondo ». Skribu al Dominique Despiney, 43, quai de Champagne F-94 Le Perreux.

— Fervojista kongreso, 6-12a de Majo, en Lugano (Svislando). Adreso : S-ro Kurt Greutert, Via Mante Ceneri, CH-6512 Giubiasco, Svislando.

— Sveda Somera Semajno, en Frostvallen, Svedujo, 30.7-6.8. Adreso : S-ro Jan Stronne, Amiralsgatan 36, S-21155, Malmo, Svedujo.

— Junulara kongreso de T.E.J.O., en Torun, Pollando, 17-23a de Julio. Temo : « La junularo kaj la tria mondo ».

— Somera Esperanto-Universitato, en Gyola (Hungario), 10-16a de Julio. Adreso : S.E.U., 48-as. u. 11, Gyula, Hungario.

— Internacia Turista Renkonto, en Szeged, Hungario, 24a de Julio - 3a de Aŭgusto. Adreso : S-ro Emeriko Szekely, Szivarvany u. 29, Szeged.

— Internacia renkonto de esperantistoj-naturamikoj, 24a de Julio - 2a de Aŭgusto, en Abaliget (Hungario). Adreso : H.E.A., 3a Teritoria Komitato, Pecs 1, Poŝtfako 2, Hungario.

— Hungara Kultur-Festivalo, en Budapest, 17-23a de Julio. Skribi al : Hungara Esperanto-Asocio, Budapest 5 Poŝtfako 193.

EN USONO

— S-ino Prof. Margaret Hagler doktoriĝis pri kompara literaturo en la Universitato Indiana pere de disertacio titolita : « La lingvo Esperanto kiel perilo literatura » (450 paĝa anglalingva dokumento !).

— En Usono, dek gravaj Universitatoj instruas aŭ baldaŭ instruos Esperanton.

— S-ro Prof. Auld kiu ankoraŭ lastan someron estis speciale invitata por veni en Usonon gvidi oficialajn esperanto-kursojn en la kadro de la ŝtata kolegio de San Francisco, havis fruktodonajn interparolojn kun edukistoj kaj estis intervjuita ankaŭ en televida stacio de Ĉikago.

— Estis starigita esperanto-organizaĵo en Florida kiu kunlaboros kun la esperanto-kursoj planitaj ĉe la Fort-Landerdale universitato.

ESPERANTO ĈE BONN-UNIVERSITATO

La laborrondo Esperanto ĉe la Rheinische Fridrich-Wilhelms Universitato en Bonn daŭrigas kursojn por komencantoj kaj progresantoj. Krome okazas germanlingvaj prelegoj pri esperantologio kaj esperantismo.

LERNEJA EKSPERIMENTO EN GERMANIO

La kulturministro de Nordrejno - Vestfalio konsentis pri la eksperimenta instruado de Esperanto en klasĉambroj, por la lerneja jaro 1972-1973.

PUPTEATRA FESTIVALO

La 4a pupteatra internacia festivalo, kiu prezentas pupteatrajn trupojn el diversaj landoj, kiuj ludas en Esperanto, okazis kun granda sukceso en Zagrebo, komence de Oktobro.

KONGRESO DE LA NORMANDA FEDERACIO DE FRANCUJO

La kongreso de la normanda federacio okazos en Vire (Calvados - 14 Francujo) la 25-an kaj 26-an de Marto 1972. Multnombra partoprenantaro estas esperata. La regiono estas alloga laŭ turisma kaj gastronomia vidpunktoj. Por informoj oni sin turnu al S-ro Legret A. U.E.A.-delegito, 14, rue des Sablonnières, 14 - Vire (Francujo), aŭ al S-ro Colleu M. Staciestro, place de la Gare, 14 - Vire (Francujo). La 27-an de Marto povos okazi ekskurso al Mont-Saint-Michel (distanco : 70 km.), se la partoprenantoj estos sufiĉe multnombraj. Ili sin anoncu frue.

AŬTOMOBILISTA KLUBO

S-ro G. Grattapaglia, respondeculo por tiu internacia fako informas ke li nun havas proksimume 600 membrojn el 26 landoj. En Francujo 23 personoj aliĝis antaŭ 1968, kaj nun devus realigi sian aliĝon pagante 6 Frs. Poste aliĝis 57 personoj kiuj, laŭ decido de la kongreso de Helsinki, estas Dumvivaj Membroj. S-ro Grattapaglia opinias ke, se oni povus esti pluraj miloj en la klubo, li povus ricevi subvenciojn de grandaj firmaoj kaj petrol-kompanioj.

Sendu vian kotizon al J. Guillaume (P. ĉ. 1899-91 Paris) kiu sendos al vi la modernan insignon de la klubo por meti ĝin sur via aŭto. Kiu deziras pluan ekzempleron aldonu 2 Frs.

EKSTERORDINARA SAVADO

Subite fajrero ŝprucas kaj Riku fariĝas vivanta torĉo.

Riku Ruopsa 36-jara dejoris en ŝipkonstruejo en Stokholmo. En tiu 26-a de novembro li laboris sur la « Birger Jarl ». Je la 15-a li enŝoviĝis, tra malgranda aperturo, en la kaldronegon por froti ĝiajn vandojn per petrolo. Subite fajrero ŝprucas (eble pro fuŝkontakto ĉe la fadeno de la movlampo, kiun li tenas en mano), ŝprucas kaj ekbruligas lian laborveston sorbigitan je oleo. Tuj li iĝas vivanta torĉo. Li rampas sur 4 metroj ĝis la aperturo; li sukcesas eliri. Vera flam-kirlo, li trairas 12-metran ponteton, malsupreniras 2-metran ŝtupetaron kaj alvenas en la maŝinejon. Li hurlas : « Faru ion ! mi brulas ! mi tuj mortos ! » Muta pro hororo mekanikisto prenas estingilon kaj estingas la flamojn. Riku elŝiras siajn vestojn detruitajn de la fajro ; li konstatas, ke samtempe li forŝiras nigrigitajn haŭto-pecojn kaj ke la ostoj de sia mano estas nudaj. Li ĝemas per raŭka voĉo : « Aeron ! ». Forpuŝante la mekanikistojn, kiuj provas lin helpi, li, ŝanceliĝante, suprengrimpas du ŝtuparojn altajn je 2 metroj, kiuj kondukas al ferdeko. Estas nur en ambulanco, ke Riku komencas senti la neimageblajn suferojn ; ĉe lia alveno en Karolinska-Hospitalo de Stokholmo li estas ankoraŭ plene konscia.

Doktoro Sten-Otto Liljedahl, estro en la sekcio de la brul-vunditoj, tuj faris morfino-injekton al la viktimo. Post ekzameno, li konstatas, ke nur la blondhara kapo kun bluaj okuloj, parto de la vizaĝo, la kolo, la ŝultroj kaj malgranda parto super la maldekstra kubuto estas netuŝitaj. La cetero de la tuta korpo estas tute brulita : 80 % de lia haŭto ne plu estas kaj 45 % el tiuj bruloj estas 3-a-grade gravaj : tio signifas, ke la haŭto ne povos mem restariĝi.

« Se ni sukcesos lin savi estos miraklo »
diras D-ro Liljedahl

D-ro Liljedahl kaj liaj helpantoj efektivigis sensaciajn rezultojn, ne per tradiciaj metodoj (helpe de steriligitaj humidaj bandaĝoj), sed per aero varma kaj seka sur speciala lito

Estas por policisto, brulvundita ĉe akcidento, ke tia lito estis antaŭe konstruita ; estas nur kelkajn horojn post la akcidento, ke li plendis pro malvarmo : la histoj detruitaj, grandkvante perdas akvon kaj aliajn likvaĵojn. Tiu forvaporiĝo okazigas malvarmon. Koro, reno kaj aliaj organoj plej rapide laboras por refari tiun akvon. Supermezura tasko !

La varmiganta lito akcelas forvaporiĝon sed alportas la necesan varmon, kiun la korpo ne plu bezonas krei dum tiu forvaporiĝo. Tia lito permesas ankaŭ plirapidan formadon de krustoj sekaj kaj duraj, kiuj ŝirmas la vundojn kontraŭ infekto-riskoj.

D-ro Liljedahl perfektigis tiun liton : sponga-kaŭĉuka matraco kovras maldikan aerumilon el krucoplakaĵo ; sur ties flanko senhumidigilo malpliigas ĝis 15 % la humidecon de la enblovita aero, kiun ĝi samtempe varmigas ĝis 38°. Tiamaniere la nuda korpo de Riku vivas en seka atmosfero, kies temperaturo similas tiun de afrika dezerto. Tio helpas la pacienton kaj malhelpas, ke li ŝvitu.

Pro la amplekso de la brulaĵoj, la kuracisto troviĝis antaŭ nova problemo. La varma kaj seka aero tiel rapide senakvigis la korpon de Riku, ke, en la unua tago, oni devis engutigi al li 26 litrojn da likvaĵo. Por ekzakte anstataŭigi la perditan akvon oni instalis la liton sur hidraŭlika pesilo, kiu montris akvo-perdon eĉ je 2 gramoj. Seninterrompe specialisto restis apud la lito kaj horon post horo notis la perdon por ĝin anstataŭigi.

Dum la senfinaj unuaj 36 horoj, Riku, balancita sur la ondoj de neesprimebla agonio, nenion sciis pri kio okazis ĉirkaŭ li. Li deliris... Li retroviĝis en la patruja vilaĝeto : Keni, norde de Finnlando, meze de la grandaj nigraj pinoj de la apuda arbaro. Li aŭdis sian patron, brava hakisto, kiu konsilis al li : « Riku, kion ajn ci faras, ĝin plej bone faru ! ».

De tempo al tempo li rekonsciiĝis.

Li malpli sentas siajn suferojn, kiam li senmove kuŝas sur aluminio-teksaĵo permeabla, etendita sur tavolo de sorbanta papero. La kontakto kun tiu metaligita surfacaĵo malpli doloriga lian dorson ol tiu de littuko ; kiam li moviĝas, tiu aluminio-folio, desinfektanta kaj kontraŭ-ŝvitanta, forlasante la paper-duoblaĵon adheras al liaj vundoj.

Sed la flegistinoj ne lasis lin ripozi : « Kiel eble plej multe provu moviĝi ; tio permesos konservi viajn fortojn kaj via sango-cirkulado ne estos perturbita. Riku kunpremis la dentojn kaj faris sian eblon, eĉ pli ol oni petis de li ; la duan matenon, li mirigis la flegistinojn, kiuj venis por ŝanĝi liajn litaĵojn : Li petas, ke oni helpu lin por eliri el sia lito kaj stariĝi sur siaj piedoj, voritaj de la fajro ; li murmuretas : « estos pli facile ol se vi devus min turni ». D-ro Liljedahl, kiu ĉeestas, ridetas. De ĉiam li sciis, ke por bone resaniĝi malsanulo bezonas tiom siajn proprajn vivo-volon kaj lukto-deziron, kiom bonan kuracadon.

Sed, certe, Riku, pri tio, estis ĉampiono !

La varmiganta lito bone efikas. Post unu semajno, duraj kaj protektantaj krustoj ŝirmas la vundojn. Sed la membroj kaj artikoj estas rigidigitaj. Riku scias : « ju pli oni restas sen moviĝi, des pli oni riskas morti ». Tial, malgraŭ kruelegaj suferoj, li ne ĉesas laborigi sian brakon. Por la 10 specialistoj de la brulitoj-sekcio estas la momento interveni.

Ĉiutage, ĉe regulaj intervaloj, Suzanna Svartengren, komplezema fiziologo-terapeŭto, venas al li por laborigi lian torakon kaj helpi lian spiradon. Eĉ ŝi sukcesas, tirante, puŝante... funkciigi je kelkaj centimetroj, la blokitajn artikojn de liaj kubutoj kaj genuoj. Iom seke ŝi diras : « Mi scias, ke estas tute ne gajiga, sed estas necese se vi volas resaniĝi ». Riku akceptis per kapjeso kaj kunpremis la dentojn sur siaj suferoj.

Kaj unu matenon estis infero !

Sur brankardo oni transportas Riku ĝis malgranda ĉambro. Tie oni lin banas en varma salita akvo. Poste per tondiloj kaj pinĉiloj, D-ro Liljedahl kun du el liaj asistantoj entreprenas, post leĝera anestezo, elpreni la krustojn, kiuj ĝis nun protektis la vundojn. De tiam estas necese, ke tiuj krustoj malaperu por ke la vundoj cikatriĝu. Riku plej multe suferas. Finnlingve li blasfemas kontraŭ la medicinistoj, kiuj ne konprenas la finnan lingvon. D-ro Liljedahl admiras sian pacienton : « Ankoraŭ iom da pacienco » li dolĉe ripetas. Tiu flegado daŭras 2 horojn kaj duonon.

Baldaŭ Riku ekscias, ke li devos elteni tiun torturon ĉiun duan tagon, dum preskaŭ 4 monatoj.

Por malpliigi tiun monstran suferon oni povus injekti al li fortan dozon da morfino. Sed por eviti alkutimiĝon al la drogo la Doktoro nur tre ŝpareme donas ĝin al li. Riku povas fidi nur sian propran rezisto-kapablon. Dum 3 semajnoj, kiam la sufero fariĝis tro granda li dronis en duan senkonscion.

Kio estis plej dolĉe al li estis la vizito de lia edzino ; kaj ankaŭ la ĉeesto de Anna, la help-flegistino ; ŝi restas apud li por lin kuraĝigi ; ŝi karesas lian frunton, parolas pri lia ĝardeno, kaj en la plej malbonaj momentoj dolĉe kantetas al li kanzonon.

Oni komencis rekonstrui la surfacaĵojn de lia korpo. La plej multo el liaj vundoj estis ankoraŭ tre profundaj kaj disŝiritaj por ricevi definitivajn greftojn. Oni ilin kovris per haŭtobendoj elprenitaj sur donintoj, kiuj ĵus mortis en la hospitalo. Post 15 tagoj Riku forĵetis tiujn homo-greftojn kaj oni ilin anstataŭgis per aliaj. Sed intertempe ili servis por protekti la plej gravajn vundojn kontraŭ infektado kaj ekigi cikatriĝon, tiamaniere ke oni baldaŭ povos fiksi daŭremajn greftojn.

Post ses semajnoj oni komencis mem-greftojn ; oni povis uzi nur la propran haŭton de Riku en la partoj netuŝitaj kaj eĉ ĉe la jam cikatriĝintaj (apenaŭ 20 % de la tuta korpo). En 12 semajnoj oni efektivigis 6 elprenojn. La unua el tiuj delikataj operacioj okazis sub ĝenerala anestezo. Oni elprenis haŭto-bendojn 12 cm-longajn, 5 cm-larĝajn kaj nur 2/10 de milimetro-dikajn. Poste la Doktoro disigis tiujn bendojn en pli malgrandajn fragmentojn, kiujn li fiksis, kiel poŝtmarkojn sur la malpli gravajn vundojn. Bendita je homogreftoj, punktita je mem-greftoj, Riku ŝajnis premsonĝa ĉifonpupo eliĝinta el la manoj de mallerta metiisto.

Sed lante kaj zorgege la rozaj makuloj de sana haŭto grandiĝis, iom post iom venkantaj la disŝiritajn histojn.

La semajnoj pasis ... Fine de februaro, lia edzino venis kun la eta Vappu. La okuloj de la etulino iom larĝiĝis, kiam ŝi donis al sia patro la bukedon kolektitan por li ; ŝi rigardis liajn senmovajn brakojn kaj manojn kaj diris : « li havas doloron, paĉjo ! » kaj ŝi reiris al sia pupo kaj Riku sopiris

Iom antaŭ Pasko, Riku subtenita de du flegistinoj faris siajn unuajn paŝojn ; ŝvito perlis al lia frunto, ĉar fleksigi genuojn estis torturo. Tamen li daŭrigis siajn klopodojn ; kelkajn tagojn pli poste, nur apoginte sin sur ĉaro. li sukcesis iri sola de sia lito al sia seĝo ; la sekvantan semajnon li laŭiris la 10-metran koridoron, iron kaj reiron.

Por ke li retrovu siajn fortojn oni instalis sur lia lito ilon kun pedaloj, por ke li uzu ĝin 10 minutojn dufoje ĉiutage ; la flegistinoj, multfoje trovis lin klopodante sur la pedaloj, (malgraŭ siaj piedoj ankoraŭ vunditaj kaj doloraj)... tage kaj nokte. Neniam D-ro Liljedahl vidis homon tiel kuraĝa. Singardema li rezervis sian diagnozon dum la tuta tempo, kiam restis dubo en lia spirito. Sed komence de majo li ne plu hezitis kaj diris al Riku : « Vi estas la plej grava vundito, kiun mi vidas elsaviĝi el tiel terura akcidento. La Doktoro aldonis « Tio, kion vi faris estas sensacia. Vi estas viro eksterordinara ». La granda Finno ruĝiĝis pro konfuzo kaj trankviliĝis, kiam la Doktoro foriris. Li revenis al sia aventuro-romano, sed estas la flegistinoj, kiuj turnis la paĝojn, ĉar liaj fingroj estis ankoraŭ nesufiĉe flekseblaj.

Je la fino de julio, li faris promenadojn pli kaj pli longajn en la najbara parko. La Doktoro certigis, ke li baldaŭ retrovos normalan vivon.

Dum li energie pedalas sur sia aparato por redoni fortojn al siaj gamboj li diras al sia edzino : « unu baldaŭan tagon mi telefonos al Doktoro Liljedahl ; li promesis al mi, ke ni kune bicikle ĉirkaŭiros la Vattern-lagon ».

ĈIELARKA MONDO

La esprimoj : ruĝa pro honto, verda pro timo, nigra pro kolero, blua pro surprizo, havas plej veran sencon en la submara mondo. En tiu medio la bestaj pasioj esprimiĝas pere de majstra polikromio. Konsideri tiujn kolorbrilojn, kiuj iluminas oceanojn kaj niajn akvariojn nur kiel ornamon estas eraro. Ĉiu koloro estas signalo kaj la vivo de la fiŝoj tute disvolviĝas en senlima ĉielarko.

***

Longtempe ni konsideris nian Teron ĉe mezvojo inter la luma ĉiela Spaco kaj la opaka mondo de la Oceanoj. Longe oni opiniis, ke, en firmamento, ĉio radias, viviĝas kaj kolorkantas, dum, kontraŭe, en la oceanoj estas nur torporo, obskureco kaj silento. Hodiaŭ, astronaŭtoj kaj plonĝantoj alportis al ni novajn vidpunktojn. Se la ĉielo ŝajnas al ni blua kaj luma, se la maro montriĝas al ni glaŭka kaj obskura, estas ĉar ni vidas ilin de ekstere.

Ni eniru en ilian mondon.

Transe de la maldika atmosfera tavolo, kiu ĉirkaŭas nin, la « ĉielo » ne plu ekzistas. Estas nur vakuo, malvarmo, silento kaj tenebro.

Sub la hula mara surfaco ĵo malfermiĝas vastega plej miriganta mondo. Tie multiĝas movoj, iroj kaj reiroj, floradoj ,alvokoj kaj ruĝbrileco. En tiu privilegia mondo, akvo abunde liveras al la vivaĵoj oksigenon kaj karbonatan acidon, salojn kaj mineralojn ; la temperaturo malmulte varias kaj la rezisto al gravito estas pli bona ol sur tero. Tie ĉi troviĝas la plej bonaj vivkondiĉoj por la multnombraj maraj vivaĵoj : de la planktonaj estaĵoj ĝis la bluaj « rorkualoj » (30 m. — longaj kaj 150 tunoj-pezaj) vivantaj en Arktiko. Ili estas plej diversaj, plej strangaj, plej graciaj kaj plej lumaj. Larĝa estas la kolor-paleto de tiuj maraj kreitaĵoj, de la plej palaj ĝis la plej brilaj. Estas tiu brileco, kiu plej mirigas la unuafojajn plonĝantojn, kaj ankaŭ la fakto, ke tiuj estaĵoj povas, nekredeble rapide, sub influo de internaj aŭ eksteraj stimuliloj, ricevi tutajn kolorŝanĝojn, momentajn aŭ daŭrajn. Ĉiu el ni rimarkis, kiom rapide la ankoraŭ vivanta iriza perko senbriliĝas, kiam oni ĝin eltiras el akvo.

La kolor-fenomenoj estas du : fizika kaj kemia.

Strukturaj kaj fizikaj fenomenoj : refrakto, difrakto, difuzo.

Refrakto : la lumo trairas tre fajnajn ŝeletojn : same okazas ĉe sapo-veziketoj aŭ ĉe flakoj de hidrokarbidoj flosantaj sur akvo. Same iriziĝas la flankoj de fiŝoj aŭ la « mantelo » de kelkaj moluskoj.

Difrakto : Kiam lumo pasas tra la membranetoj striitaj je mikroskopaj fendoj, okazas ŝanĝantaj kolorbriloj ; samajn oni konstatas, kiam oni manipulas la testacelojn de « mar-orelo » aŭ de perlostro.

Difuzo de « Tyndall », pro specialaj partikuloj. La diametro de tiuj partikuloj estas ekstreme malgranda 600/1 000 000 de milimetro. Tiu mezuro estas pli malgranda ol la ondo-longo de la ruĝo aŭ de la flavo ; sekve, tiuj partikuloj ne perturbas la grandajn ondo-longojn de la lumo sed difuzas la kurtajn ondo-longojn. Tiu fenomeno naskigas unukoloran bluon kaj eksplikas la lazuron de la ĉielo.


Ĉe fiŝoj tiuj partikuloj konsistas el mikrokristaloj de « guanino » entenataj en specialaj ĉeloj nomitaj « kromatoforoj ».

Kemia fenomeno :

Tiuj « kromatoforoj » estas retenitaj en reto de pli dikaj ĉeloj, kiuj enhavas « melaninon » ; tiu ĉi estas la nigra pigmento, kiu konstituas la fundamenton de la ĉiela bluo. Tiu melanino koloras la densan inkon de la sepioj.

Krome ni citu la « karotenojn », oranĝ-kolorajn aŭ ruĝajn, kaj la « pterinojn » ; ankaŭ tiuj ĉi estas oranĝ-koloraj aŭ ruĝaj ; kiam la karotenoj kuniĝas kun proteinoj rezultas aliaj koloroj. Tio okazas ĉe la omaro ; ĝia origina livreo estas nigre-blua ; ĝiaj piedoj estas ultramaraj kaj ĝiaj antenoj karmezinaj ; kiam oni kuiras la malfeliĉulon, la varmo apartigas la pigmentojn de la proteinoj kaj, ĉar nur la « karoteno » restas en la karapaco, la omaro aperas sur nia tablo en skarlata vesto.

La koloroj rezultantaj je fizikaj fenomenoj rapide malaperos post la morto ; kontraŭe ĉe kemiaj fenomenoj, nigro, flavo, ruĝo kaj iliaj miksaĵoj



restos post la morto ; tamen ilia brilo iom post iom estingiĝos kaj ne plu estos kolor-ŝanĝoj. Ĉe la vivantaj bestoj, la pigmento entenata en la stelformaj « kromatoforoj » povas esti aŭ koncentrata aŭ distribuata en la tuta ĉelo, pere de reguliganta mekanismo, kiu funkcias dank'al ĉeesto en sango, de hormonaj determinantoj rilatantaj kun eksteraj perceptaj stimuliloj.

En la maro, pli ol ie ajn, la koloroj esprimas staton, elsendas mesaĝon. Por pluvivi estas nepre necese, ke la bestoj estu nevideblaj en la substrato

en kiu ili vivas, aŭ por eskapi al la ĉasistoj aŭ por pli facile alproksimiĝi al predo. Nepre necesas, ke la maraj bestoj rekonu la aliajn kaj igu sin rekoneblaj ; ke, konformiĝante al la ĉirkaŭanta medio, ili erarigu la predantojn ; dank'al siaj flavaj kaj verdaĉaj bendoj la « pterofrino de Sargasses » iĝas nevidebla meze de la algoj, kie ĝi vivas ; eĉ ĝi ornamas sin per kvastoj kaj puntoj similaj je la flos-guŝoj de tiuj algoj. Pli ĝenerale ni rimarku, ke, ĉe la mara surfacaĵo, la bordaj specioj havas dorson malhele bluan kaj ventron arĝente blankan ; vidataj de supre ili miksiĝas kun la koloro de la maro ; vidataj de malsupre ili similas la brilecon de la ĉielo. La pelagaj fiŝoj estas ĝenerale nigraj aŭ malhele grizaj kaj tiuj de la koraloj estas ruĝaj kiel la branĉoj de la poliparo. Tiuj, kiuj vivas sur la sabla fundo de la marbordo estas grizaj kaj leĝere punktitaj ; tiuj de la atoloj estas multkoloraj simile al la madreporoj ĉirkaŭ kiuj ili vivas ; kiam la substrato estas neregula la besto montras disrompan, marmorecan koloron. En sia juna aĝo la « Stegostoma fasciatum » (leopardo-ŝarko) traserĉas etajn organismojn en la algoj ; tiam ĝi estas malhele nigra kun blankaj strioj ; laŭmezure kiel ĝi kreskas tiuj strioj iom post iom malaperas kaj lasas sur la adoltulo nur la ocelojn, kiuj donas al ĝi ĝian nomon.

Dank'al la moviĝemo de la pigmento entenata en la kromatoforoj, kelkaj fiŝoj, tiel rapide kiel kameleono, kolorŝanĝiĝas. Soleo kaj plateso hele blondaj sur sabla fundo iĝas nigraj sur bazalto-fundo kaj makuliĝas je blanko, felkoloro kaj bruno sur multkoloraj ŝtonoj. La papilio-fiŝo montras falsan okulon sur sia vosto kaj la predanto anstataŭ kapti kapon vidas la predon fornaĝi al alia direkto.

Kelkaj koloroj signifas ke la fiŝo estas danĝera ; tia estas « Plotosus Anguillaris » ; ĝi vivas en Ruĝa Maro kaj Hindia Oceano ; en gagata vesto tiu malgranda fiŝo estas ĉirkaŭita de bluaj bendoj tre karakterizaj ; ili diras « atentu, ĉe mia dorsa naĝilo mi havas venenan dornon ».

La tropikaj fiŝoj estas veraj juveloj ; ĉi tie la madrepora medio mem estas ekstravagance kolorita ; la bestaj specioj abundas kaj iliaj koloroj plej pompas.


Jen la « Pomacanthus Imperator » blua kaj nigra, vejnita je ebur-oranĝ-citron-koloroj. Jen la luksega « Chaetodontophus conspicillatus », kiu montras faraonan maskon knedita kun okro, briligita je muaro, ŝminkita je « rimelo ». Jen la fama « Lienardella fasciata », kiu ornamis en 1958 poŝtmarkon de Nov-Kaledonio ; kaj la gracia « Coradion Altivelis » orumita kiel Lepidoptero. Jen la belega « Parancanthurus tenthis » ĉe kiu la bluaj veluroj kaj la profundeco de la ebonoj reliefiĝas pro la viva oro de la empena vosto.

***

Amoro-rito sur plata ŝtono :

Nur la kolora filmo permesis malsekretigi la gestojn de la paruloj. D-ro Albrecht, unu el la kunlaborantoj de P-ro Lorenz en Seewiesen plej zorge filmis paron de « Haplochromis burtoni ». Estas printempo. La universala seksa maltrankvileco turmentas la femalon, kies ventro ŝvelas pro frajo (estas la samaj hormonoj, kiuj perturbas niajn pensojn). Ŝi sopiras pri tiu nepre necesa feliĉaĵo : eligado de la ovoj. Sed — mistero de la Naturo — nur vido de siaj propraj ovoj (aŭ ŝajnantaj) ekigos en ŝi la nerczisteblan forton, kiu okazigos tiun eloviĝon !

Estas la masklo, kiu elektas la frajejon : estas plata ŝtono, sur kiu la kurento demetis kelkajn grajnojn de sablo. Per sia buŝo li forpuŝas kelkajn el ili kaj lasas kelkajn aliajn (tiuj ĉi tute similas la ovojn) ; kaj li invitas la inon. Stranga ŝajnas lia konduto : li trenas sian anusan naĝilon sur la plata ŝtono ; ankaŭ sur tiu naĝilo kelkaj makuloj tute similas la ovojn.



Tre interesita montriĝas la femalo ; ŝi alvenas, plonĝas, turniĝas... kaj eligas ovojn ; la masklo iom malproksime atendas. Post rapida reveno, ŝi denove eligas ovojn sur la platan ŝtonon. Du-tri fojojn ŝi rekomencas kaj fine... ŝi prenas la ovojn en sian buŝon. Samtempe kun la ovoj, ŝi eligis likvaĵojn, kies celo estas provoki ĉe la masklo spermelĵetadon. Li spermelĵetas sur la platan ŝtonon kaj rekomencas ĝin karesi per sia naĝilo sur kiu brilas la oranĝ-koloraj makuloj. La ino revenas sed ĉi-foje estas la spermo, kium ŝi prenas en sia buŝo.

La operacio estas finita : la spermatozooj fekundos la ovojn.

MICHEL-FERRAN (Atlas).

LA GRANDA PIRAMIDO

« La antikvaj Egiptoj neniam aludis pri la rilatumo inter la cirkonferenco kaj ties diametro, nek pri la nombro Pi (3,1416) ; oni neniam vidas, ke ili ekskluzive uzis por multiplikoj aŭ divido la nombrojn 2, 3, 5, 7, esence piramidaj ; nenio ebligas supozi ke, ili konis la rilatumon inter la altitudo kaj la alteco de la poluso ; nek ke ili havis klaran ideon pri la refrakto kaŭzata de la aeraj tavoloj ; ili sendube ignoris la dikecon de la Tero ; ili ne kutime uzis la sanktan ulnon, kaj kredeble, ili tute ne pensis ke tiu ulno reprezentas ekzaktan frakcion de la polusa radiuso de nia globo (1) ; kaj sekve ili ne povis kalkuli per piramidaj ulnoj la vojon iratan de la Tero dum sia rivolucio ĉirkaŭ la Suno ; la pezo de la Tero kaj ties meznombra temperaturo estis ekster ilia penso ; ili ne mezuris la teran sferon, nek la distancon de la Tero ĝis la Suno ; iliaj kapacitaj kaj pesaj mezurunuoj ne estis deduktitaj el la piramidaj kalkuloj ; ili neniam mencias la Polusan Stelon, nek la jarojn de la precesio, k.t.p.

« Nu la fakto ke, ĉiuj tiuj konkeraĵoj de la scienco estas en la Granda Piramido, laŭ naturaj grandecoj mezuritaj kaj ĉiam mezureblaj, nur bezonante por esti videblaj la metran signifon, kiun ili enhavas, estas evidente neklarigebla per niaj konaĵoj pri la antikva civilizacio ; sed ĝi estas fakto nedubebla, kaj tio enigas en la plej grandan mirkonsternon niajn modernajn sciencistojn ».

Tio pruvas, ke la konstruintoj de la Granda Piramido posedis neimageblan sciencon ; sed ankaŭ ke tiu scienco estis zorge kaŝita al la popolo kaj sekrete konservata en la temploj. Eĉ, relative ĵusa hipotezo diras ke, tiu scienco povis esti heredaĵo de antaŭa malaperinta civilizacio, eble de tiu Atlantiso, ĉiam konsiderata kiel fablo, sed kiun novaj geologiaj kaj arkeologiaj eltrovoj ŝajnigas eblan realaĵon.

Eloi MOTILLON.

(1) Ĝi estas la dek-milionono aŭ dek-miliona parto de la polusa radiuso mezurita de la centro de la Tero.

ĉu instinkto - ĉu inteligenteco, ĉe la bestoj ?

Estas tre malfacile taksi la valoron de ambaŭ faktoroj, sed tute certe ambaŭ estas konstateblaj laŭ diversaj gradoj.

Mi opinias ke, ĝenerale, la hejmaj bestoj prezentas ofte altan gradon de inteligenteco. Kiu ekzemple ne audis foje personon diri pri sia hundo : al ĝi mankas nur la parolkapablo ?

Parenteze, oni povus sin demandi : ĉu la hejmaj bestoj evoluis intelekte sekve de kunvivado kun la homoj ? aŭ, ĉu la homoj sukcesis ilin malsovaĝigi, dresi, ĉar tiuj bestoj jam nature posedis la kapablon kompreni ordonojn, obei ?

Krome, estas facile noti diferencon de inteligenteco inter la diversaj specoj kaj ankaŭ inter la individuoj de sama speco. Do, ŝajnas ke samkiel ĉe la homoj, la grado de inteligenteco estas persona afero.

La bestoj kondutas grandparte laŭ heredata instinkto sed ili kapablas evolui, iamaniere lerni ion. Povas esti ke la hundo okupas la plej superan gradon, sed, la ruza kato tre inteligente ankaŭ pripensas por agrabligi sian ĉiutagan vivon kaj por eskapi ĝustatempe el la danĝeraj situacioj...

Ni ne forgesu ankaŭ la bravan ĉevalon kiu en la daŭro de 3 aŭ 4 jaroj lernas la manieron plenumi multajn helpajn laborojn en la farmo. Tio, jam preskaŭ apartenas al pasinteco pro apero de la traktoroj. Oni ne multe rekonas inteligentecon ĉe la ĉevalo sed mi opinias ke ĝi tamen devas posedi por bone memori dum sia tuta vivo ĉiujn movojn farendajn en plej variaj cirkonstancoj. Kaj, pri la simplaj bovinoj kiuj ne estas tre alte konsideritaj, mi ankoraŭ memoras el la junaĝo ke tiuj dikaj bestoj jam komprenis la postulojn de la moderna trafiko. Oni rimarkis ke unu inter ili okupas kutime la unuan lokon en la vico, plirapidigas la paŝojn por kontroli la situacion de trairota aŭtovojo kaj tiam haltas momenton (stop-signalo) kaj laŭeble antaŭen iras sekvata de la tuta vico. Tio ne povas esti heredata instinkto de la pratempo sed pripensita adaptiĝo je aktualaj problemoj.

Nun, pri la « liberaj » bestoj : Sendube, ĉe ili ĉefe regas la instinkto. Por ili ĉiam prezentiĝas la samaj problemoj : trovi la nutraĵon kaj sin defendi kontraŭ la malamikojn, eviti la kaptilojn de la homoj.

Sendube pro instinkto kiu estas la rezulto de multjarmila timo, la sovaĝaj bestoj fuĝas rapide je apero de la homoj kaj tion mi tre bedaŭras. Ke estu birdoj aŭ kvarpieduloj, ĉiuj forkuras time kiam ni alproksimiĝas. Kontraŭe, multaj specoj amike kunvivadas. Oni povas rimarki ankaŭ diferencojn inter la diversaj specoj. Ĉu temas pri nura instinkto aŭ formo de inteligenteco, oni ne povas diri sed, ekzemple — la ĉasbestoj ne egale kondutas antaŭ la malamiko. La perdrikoj ŝajnigas esti vunditaj, ili malrapide lame paŝas je kelkaj metroj de la homoj por, dume, ebligi al la idoj sin kaŝi en apudaj heĝoj kie ili retroviĝos post la turmento. Tio estas ruza konduto. Male, la fazanoj kondutas kiel eble plej stulte. Precipe la bela koko-fazano kiu trankvile paradas por montri sian koloran plumaron kaj je la momento fuĝe ekflugi ĝi lanĉas sian fortan raŭkan krion tiel ke la ĉasisto facile rimarkas ĝin. La ino, pli modesta kaj grizkolora, humile kaj silente glitas pli sekure sub la arbustoj. Kiam, post paciencaj traktadoj, oni sukcesas rilati amike kun la birdoj, oni povas konstati ke ili ankaŭ kapablas lerni multajn aferojn.

Do, ĉu evolukapablo = inteligenteco ? Mi opinias : jes kaj mi estus feliĉa se ĉiuj bestoj povus konversacii kun ni.

P. MÉTIVIER.

ALBIN KALPAY :

KLARVIDO ? ANTAŬSENTO ? HAZARDO ?

(Por kompletigi la sciigojn de Aleksandro Logvin en Nro 2 1970 de « Kulturaj Kajeroj » sur p. 9).

Hamlet : « Ekzistas inter la ĉielo kaj tero pli da aferoj, ol filozofoj instruas en la lernejoj ». Shakespeare.

La historio de la homaro estas plena de raportoj, rakontoj, priskriboj — ne nur en la sanktaj skriboj de diversaj religioj — kiuj enhavas ŝajne enigmojn, profetaĵojn, antaŭsentojn, telepatiajn sciigojn.

La fama aŭtoro de la Divina Comedia mortis la 13-an de Septembro 1321. Liaj filoj : Jacopo kaj Pietro zorge serĉis kaj kunmetis la diversloke metitajn manuskriptojn de la majstroverko. Boccaccio priskribas en sia libro pri Dante, ke la serĉado ne estis plene sukcesa. La lastaj dektri kantoj mankis. Eĉ post multmonataj serĉadoj ili ne trovis ilin. La du filoj havante poezian talenton jam proponis, ke ili skribos la mankantajn kantoj. Sed tiam Jacopo havis mirindan vizion. En lia sonĝo aperis en brila blanka vesto lia patro kaj Jacopo kompreneble tuj demandis, ĉu la granda verko estis finita kaj se jes, kie estas la mankantaj partoj. Dante manprenis la filon kaj kondukis lin en alian domon, kie li montris en sia iama dormoĉambro lokon sur la muro. Jacopo Alighieri post vekiĝo tuj kuris ankoraŭ dum la nokto tra la stratoj de Ravenna al la domo de Pier Giardini, kiu estis bona amiko de Dante. Nun ambaŭ iris al la signita domo kaj sur la loko sonĝe vidite sur la muro ili trovis kurteneton kaj sub ĝi niĉon, kiun ili ne konis. Tie ili trovis malsekan, ŝimantan paperaĵon — iom difektitan pro la malsekaĵo de la muroj : la dektri lastajn kantojn ĝis tiam vane serĉitajn.

Estus certe tre interese elserĉi en iu biblioteko la francan libron « Livres de Prophéties par Maître Noël Olivarius dr. med. » aperinta en 1542. En ĝi estas detale priskribita la vivo de homo, kiu venos sur la teron de la galloj kaj fariĝos imperiestro. La tuta priskribo antaŭvidas tion, kion faris kaj travivis Napoleono. Kiam oni montris la profetaĵon al li, li ne multe kredis ĝin. Sed post kvar jaroj releginte ĝin li ektimis kaj demandis la opinion de saĝa pastro. Tiu respondis : « La spirito de Dio inspiris tiun profetanton ».

Petrarca, la fama poeto estis bona amiko de episkopo Colonna. La poeto poste rakontis en letero al episkopo Giovanni Andrea, ke Colonna aperis en lia sonĝo kaj diris, ke li iros al Romo kaj neniam plu revenos. Petrarca petis, ke li povu akompani la episkopon, sed tiu rifuzis dirante, ke nun li ne volas lian akompanon. Petrarca teruriĝinte sentis, ke Colonna mortis. Li notis la tagon, rakontis pri ĝi al siaj amikoj kaj post 25 tagoj alvenis la sciigo, ke la episkopo mortis ĝuste tiun tagon, kiam li sonĝis pri li.

Generalo Grumbkow fariĝis malsana en Februaro 1873 dum diplomata delegita vojaĝo. La 3-an de Februaro li aŭdis bruon en sia ĉambro kaj vidis la reĝon dirante : « Nun mi mortis en Varsovio ». Post tri tagoj venis la oficiala sciigo, ke la pola reĝo vere ĝuste tiam mortis, kiam la voĉo alparolis lin.

En Fomo aristrokata virino sonĝis pri la tertremo en Messina dek tagojn antaŭ la terura okazintaĵo. Li skribis leteron al la reĝo por ordoni la evakuon de la urbo. Sed ŝia kuracisto konsilis ne fari tion, la sonĝo certe estas nur pro ŝia malsano. La sinjorino du foje sonĝis la saman kaj poste pri la afero okupiĝis ankaŭ la medicina akademio.

Pri la telepatio sovetaj scienculoj faris interesajn kaj sukcesajn eksperimentojn. Pri tio estus interese foje aparte skribi. Nun mi mencias okazintaĵon el Ameriko : Deksesjaran junulon, kiam li ludis kun amiko en ĝia ĝardeno, du friponoj atakis kaj kelkfoje pafis sur lin. Sed sen trafi lin ili forkuris. Tio okazis ĉe New-York. Samtempe en Florida, do kelkcent kilometrojn for de la ĝardeno la patrino — dormante posttagmeze — la saman vidis en sonĝo kaj eĉ la vizaĝojn de la atakantoj vidis. Post sia vekiĝo ŝi ricevis telefonsciigon, ke ŝia filo feliĉe restis netuŝita.

En 1924 okazis en Parizo : Pascal Forthuny klarvidanto vizitis d-ron Geley, sciigante al tiu, ke li vidis vizion : franca scienculo mortos pro aviadila akcidento en Pollando. Li ne kuraĝis diri nomon. Sed la 14-an de Julio dro Geley apud Varsovio pro falo de aviadilo mortis.

Stranga okazintaĵo estis, ke hungara verkisto Géza Gardonyi — kiu kredis en la plua vivo de la spirito — interkonsentis kun sia amiko Karoly Magyari kantoro, ke kiu el ili pli frue mortos, tiu donos sciigon al la alia. La 30-an de Septembro 1922 frumatene Magyari vekiĝis profortaj frapoj sur la seĝon, kiu staris antaŭ lia skribotablo. Super tiu estis la foto de Gardonyi. Li tuj pensis pri la morto de la verkisto kaj matene telefonis al Eger. Tie oni sciigis lin, ke Gardonyi mortis proksimume samtempe, kiam li aŭdis la tri frapojn.

La hungara poeto Petofi junaĝe per poemo konsolis sian patrinon, kiu timis lian fruan morton, ke lia nomo, lia famo vivos eterne. Kaj en alia bela poemo — legu ĝin en la nun aperinta poemkolekto en Esperanto, tradukita de Kalocsay : li petas, ke li ne mortu en lito, sed sur batalkampo por la libereco kaj liajn ostojn oni metu en komunan tombon ! Tiel okazis. Lia tombo estas nekonata. Sed... la liberecbatalo estis perdita...

MUSETO EN LA ŜRANKO

SLAWOMIR MROZEK

Iun nokton, mi elvojaĝis. Pro manko de rektaj veturlinioj al mia celloko, mi elvagoniĝis en iu stacidomo dumvoje por ŝanĝi la trajnon. Noktiĝis, mia trajno nur estis alvenonta la postan matenon.

Mi eliris el la stacidomo kaj direktiĝis al la urbeto por trovi tranoktejon. Ne estis ebleco en la hotelo, nek aliloke. Fine oni indikis al mi adreson, kie — laŭ la asertoj — mi povos esti akceptita.

Temis pri vasta malalta domo, ĉirkaŭita de ĝardeno.

« Laŭ via deziro, diris la posedanto, sed la domo estas hantata ».

Mi timis pli nokton sentegmentan ol nokton sendorman. Cetere, nokto sentegmenta estus, laŭdifine, nokto sendorma.

« Ĝi estas hantata, kiamaniere ?

— Ĝenerale, ĝi estas hantata ».

Ĝenerale : jen kio estas samtempe pli bone kaj malpli bone. Malpli bone, ĉar oni nenion scias. Pli bone, pro la sama kaŭzo. Mi akceptis.

« Mi estos antaŭavertinta vin », diris mia gastiganto kondukante min en ĉambron, kie, krom aliaj mebloj, staris ankaŭ granda ŝranko.

Kiam mi restis sola, mi ekrigardis tra la fenestro. Nenion oni vidis.

Mi demandis min : el kio konsistas, ke domo estas hantata ? Mi demetis la jakon kaj ĝin pendigis sur la dorsapogilon de seĝo.

Kio okazos al mi ?

Mi versis akvon el kruĉo en la pelveton.

Skeletoj, mortotukoj, kranioj senkarnaj ?

Mi lavis mian vizaĝon.

Tibio frapanta kalkulitajn batojn kontraŭ la vitrojn ?

Mi sekigis mian vizaĝon per la tuko.

Aŭ kapo kiu propramove ruliĝas sur la planko ?

Mi malmetis la ŝuojn.

Enorma nigra hundego ?

Mi rigardis sub la liton.

Aŭ eble nur ektoplasmo ?

Mi finis senvestiĝi kaj mi enlitiĝis. Mi ne povis ekdormi.

Pendigito en la ŝranko ?

Mi ree leviĝis kaj malfermis la ŝrankon. Ĝi estis malplena.

Ferminte la ŝrankon, mi ree enlitiĝis. Estis nenia fosforeska lumeto, krom tiu de la ciferplato de mia horloĝo. Estis multe pli ol noktomezo. La kriza momento jam pasis.

La posedanto certe mokis min.

Fine mi aŭdis skrapmordetadon mallaŭtan sed distingeblan.

Mi leviĝis kaj lumigis la lampon. La skrapmordetado elvenis el la ŝranko.

Portante la lampon, mi alproksimiĝis al la ŝranko sur la pinto de la piedoj. Mi okulumis internen tra la malfermetita pordo, prilumante min per la lampo.

Mi vidis muson.

Mi klakfermis la ŝrankopordon kaj sidiĝis sur seĝo.

Nu, tio eĉ ne donis al si la penon veni kaj fortimigi min.

Krom se tio venis sub formo de muso.

Sed tiam, tio ne estas teruriga.

Tamen, ĉu tio vere ne estas teruriga ?

Se la muso venis ĝuste tial, se ĝi devas signifi ion, tiam ĝi reprezentas multe pli ol la apero de spektro, vampir-strigedo aŭ skeleto. Eksterordinara spektro ja nur estas spektro eksterordinara. Sed muso ordinara, kio ĝi estas, se ne muso ordinara ?

Kion ĝi kaŝas ?

Miaj haroj hirtiĝis.

Krom se ĝi nenion kaŝas.

Miaj haroj malhirtiĝis.

Do, aŭ estas io multe pli terura ol la spektroj, aŭ ne indas ektimi.

Sed kiamaniere certi ?

Denove, mi okulumis diskrete en la ŝrankon. La muso estis tie, kaŭranta ĉe angulo, griza. Ĉu ĝi havas signifon aŭ ne ? Nenion ĝi malkaŝis. Ĝi rigardis min per du okuletoj similaj al du papavaj semoj. Kion oni povas deĉifri en du papavaj semoj ?

Mi klake fermis la pordon. Mia ŝvito malvarmis.

Eble ne. Sed tamen se ĝi...

Mi ekprenis la ŝuon kaj mortigis la muson. Mi sopiris, senpezigita.

Nur tiam mi ekrimarkis, ke mi estis tenanta mian ŝuon. Neniam antaŭe mi priatentis ĝin.

Mi remetis ĝin teren kaj ekesploris ĝin.

Nu do, kio, nur ŝuo.

Sed precize tio ŝajnis al mi suspektinda.

Ĉar ĝi estis iom tro nur ŝuo.

Mi decidis senmaskigi ĝin. Mi prenis la ĵurnalon kaj ŝajnigis min leganta. Kaj abrupte, mi turnis la kapon. Sed la ŝuo, kvazaŭ senintence, daŭre estis ŝuo.

Tio ja pruvis nenion.

Mi refaris plurfoje la eksperimenton. Kun sama rezulto.

Mi mallumigis la lampon kaj ree enlitiĝis. Sed mi ne povis ekdormi. La ŝuo estis tie. En la mallumo, sed tie.

Subite, mi saltmoviĝis kaj mi sidiĝis inter la littukoj. Mia koro batis.

Kaj se ne estus la muso, sed la ŝuo...

Aŭ ambaŭ...

Mi refoje leviĝis, lumigis la lampon, malfermis la fenestron kaj forĵetis la ŝuon en la ĝardenon.

Mi refermis la fenestron, kaj mi aliris al la lavotablo por lavi miajn manojn. Mi levis la brakojn.

La manikoj de mia piĵamo estis tro mallongaj, tiaj sendube mi konstatis, ke miaj manoj estis manoj.

Jes, oni devas fronti la realaĵon. Manoj.

Ili estas miaj.

Tamen estas manoj

Miaj.

Sed manoj.

Mi sidiĝis ĉe la tablo. Mi metis ilin antaŭ mi. La nerefutebla vero evidentiĝis. Estis manoj. Kaj ili kuŝis antaŭ mi.

Tiam, ili eĉ ne estis miaj, ĉar antaŭ mi.

Mano distingiĝas el ŝuo, nur ĉar ĝi estas mano. Same por muso. Alie, ne estas diferenco.

Kaj se same la ŝuo, kiel la muso kaj la manoj ?...

Ĉe ektagiĝo, la posedanto frapis mian pordon. Li alportis al mi la matenmanĝon. Ĉar mi ne respondis, li puŝrompis la pordon. Li praktikis la artefaritan spiradon kaj mi reviviĝis.

LA MALJUNA BRIGADESTRO

Estis humida suna mateno. Super la kampoj leviĝis apenaŭ videbla vaporo. Sur la floroj kaj herbetoj briletis diverskoloraj perlaj gutoj. Ili jen eklumis jen mallumis kiel sorĉaj rubenoj.

En tiu suna mateno la pioniroj estis jam je laboro inter la bedoj de la legomĝardeno. La avo Stojĉo ofte invitadis ilin atente sarki la legomojn kaj ilin ne difekti.

La pioniroj estis jam spertaj. Ili amis la maljunan avon Stojĉo, kiu dum ripozo ĉiam rakontis al ili ian fabelon.

— Nu, avĉo Stojĉo — aŭdigis sin la pionirino Silva — tagmeze ni nepre volas fabelon, tial pensu ankoraŭ de nun.

— Jes, nepre ni volas, avo Stojĉo — ripetis la amikino de Silva, Zina.

— Bone, bone, vi nur laboru bone kaj atente — respondis la avo Stojĉo.

Tagmeze, post la tagmanĝo la infanoj ĉirkaŭis avon Stojĉo kaj sidiĝintaj sur benkoj kaj herbo senpacience atendis la fabelon.

— Ja, nun aŭskultu. Vi bone laboris kaj meritas rekompencon, diris la avo. — Antaŭ longe en unu kooperativa agrikulturo laboris juna kaj simpatia agronomino nomata Vihra. Ŝi tiel multe amis la kreskaĵojn, la birdojn kaj la florojn, ke ŝi detale ellernis ĉion koncerne ilian disvolviĝon kaj eĉ ilian lingvon, kiu estis mirinde dolĉa. Jes, vi povas ne kredi, tamen tio estas vera. Ŝi parolis kun ili, aŭdis iliajn sonojn, susurojn kaj ilian spiradon. Kiel ŝi sukcesis atingi tion ankaŭ mi ne scias. Diris al mi unu kooperativano, ke ŝi posedis ian aparateton kaj sidante sur seĝeto apud la bedoj de papriko, tomatoj aŭ aliaj legomoj ŝi metis la aparateton ĉe la orelo kaj karesante ilin demandis :

— Do, kiel vi fartas, miaj karaj kaj delikataj trunketoj ?

— Mi bone fartas — respondis la plej proksima —, jen kiel bone kaj humide estas ĉirkaŭ mi ; ne estas herbaĉoj, bone mi estas prikulturita, baldaŭ oni nutris nin per diversaj saloj kaj sterkoj. Nun mi disvolviĝas bone kaj post kelkaj tagoj mi donos belajn kaj sukajn paprikojn.

— Mi tamen male — aŭdigis sin alia — Mi ne fartas bone, Hieraŭ brigadistinoj ĉirkaŭfosante min fortranĉis de mi kelkajn radikojn kaj nun mi ne povas bone nutriĝi.

— Al mi oni subfosis la tutan radikaron kaj nun mi sentas ke mi velkas — diris alia.

— Estu trankvilaj, miaj karaj trunketoj — diris Vihra — Tuj mi helpos al vi — Kaj ŝi rektigis la trunketojn ĉirkaŭfosis kaj karesis ilin.

— Sub mia radiko trapasis talpo kaj faris kanalon. Ia vermo mordas miajn radikojn kaj ili ne povas min nutri, ĉar ili pendas en la truo, aŭdigis sin najbara trunketo.

— Ah, mia kareta, kiel vi suferas — respondis Vihra. Kaj ŝi tuj piedpremis la grundon, reguligis la trunkon, karesis la folietojn, akvumis ĝin per la akvoverŝilo kaj ree ekstreĉis la orelojn aliloken kien petis aliaj.

— Iu vermo min mordas kaj mi ne povos longe vivi — plendis alia trunketo.

— Ha, atendu, mi tuj malkovros tiun malbonfaranton — diris Vihra. Kaj ŝi trafosis atente la grundon ĉirkaŭ la plendanta trunketo kaj malkovris unu dikan grizan vermon.

— Jen tiu ĉi sabotanto, tuj mi ĝin punos — diris ŝi. Kaj en la sama momento ŝi alvokis la flugantan pegon en la ĝardeno kaj ĝi englutis la vermon kaj demandis ĉu ne estas ankoraŭ aliaj.

— Tion ĉi meritas tiu griza parazito kaj malbonfaranto — aldonis iu najbareto.

Tiel Vihra vizitadis la tomatojn, brasikojn, kukumojn, iradis ĉe la plantita tritiko, sed plej multe ĉe la fruktarbetoj kie diversaj vermoj kaj raŭpoj mordadis la foliojn kaj la fruktojn.

Por ĉio ĉi ŝi notis en notlibreto kaj prelegis antaŭ la kooperativanoj. Kiam ŝi trapasis la kampojn la floroj danke klinis siajn kapetojn kaj elradiis pli multe da aromoj dirante :

— Jen nia panjo venas, ŝi ne deŝiris nin, ŝi nur karesas nin kaj protektas kontraŭ malamikoj. Kiom bona ŝi estas kaj ni miraş kiel ŝi komprenas nian lingvon Esperanto ! — Sed ŝi estas konata ankaŭ al la birdoj, eĉ al la abeloj, kiuj same parolas kun ŝi esperante — respondis la lekantoj. Tiutempe sur la ŝultro de Vihra sidiĝis unu abeleto. Ŝi prenis ĝin atente sur la mano, diris ion al ĝi, levis sian manon kaj la abeleto forflugis al sia domo ŝarĝita per poleno.

Post tio jen multkolora pego sidiĝis sur ŝian ŝultron.

— Ah, mia kara belulo — diris Vihra — mi vokis vin, ĉu vi scias pri kio ? Tie, en la ĝardeno en la ŝeloj de la pli maljunaj pomarboj troviĝas vermoj. Estu bona, komencu laboron kun viaj amikoj kaj purigu la arbojn.

— Ĉif, ĉif, ĉif — bone nia kara dommastrino. Ni faros ĉion, kio estas laŭ niaj fortoj. Ŝi karesis la belulon kaj liberigis ĝin por forflugi al la fruktĝardeno.

Tial dank-al tiu neordinara agronomino kaj dank-al atentemaj kaj disciplinitaj kooperativanoj, la kooperativa mastrumo estis unu el la unuaj en la lando. Ĝi ricevis la plej grandan rekompencon de la ŝtato.

— Sed, karaj infanoj, sufiĉas nun — diris la avo Stojĉo — ripozu bone ĉar atendas nin sufiĉe da laboro en la ĝardeno.

Pietro STOJANOV.

POR VIA DISTRO

NIA KONKURSO

Rimarko : Ĉar nia antaŭa numero aperis iom malfrue, la redakcia komitato konsentis ke vi sendu la solvojn de la du unuaj problemoj (publikigitaj en la numero 5 Septembro-Oktobro) samtempe kun tiu de la nunaj problemoj, antaŭ la fino de Januaro 1972.

Bonvolu aldoni, se vi ne jam faris, la banderolon de via gazeto.

UNUA PROBLEMO (20 poentoj)

El la ĉisubaj frazoj, kelkaj estas korektaj, kelkaj nekorektaj. Bonvolu korekti la nekorektajn. Sed atentu ! Estos kalkulitaj po 2 poentoj por ĉiu eraro ĝuste korektita, sed estos forprenita po unu poento por ĉiu malĝusta korekto.

1) Iru, pretiĝu vin.
2) Forĝisto, pro mortiĝo de homo, estis kondamnita al pendigon.
3) Vi neniam revenigos lin el sia tombo.
4) Ni povas antaŭdiri kia lingvo estas internacia, sen ia ombro da dubo.
5) Cikado tre malsata iris proksime al formiko.
6) Morgaŭ ni iros ĉe nia onklo.
7) Li havas ĉirkaŭ sesdek jaroj.
8) Ĉu mi devas piki lin kun mia halebardo ?
9) La okuloj estas plenaj je larmoj.
10) Estus dezirinda, ke ni estos amikoj de ĉiuj nacioj.

DUA PROBLEMO
(12 poentoj : po 2 poentoj por ĉiu proverbo trovita)

PROVERBOJ

1. **MTN HR STS PLN D R**
2. **LBR KJ PCNC KNDKS L PTNC**
3. **FRKT MLPRMST STS PLJ BNGST**
4. **N ŜV L NZN N FRMDN VZN**
5. **K SMS VNTN RKLTS FLMTNDRN**
6. **MLBN HRB FRSTN N TMS**

La supraj ses linioj entenas ses tre konatajn proverbojn, sed nur iliajn konsonantojn, ĉar ĉiuj vokaloj estas ellasitaj. La konkursa tasko estas : remeti ĉie la ĝustajn vokalojn kaj tiel trovi la kompletajn tekstojn de la ses proverboj.

Pri la regularo de la konkurso, bonvolu vin turni al la antaŭa numero de la gazeto.

AMUZAJ PROBLEMOJ
(apartaj de la konkurso)

LITERA ENIGMO

La solvo konsistas el 69 literoj, kiuj estas numeritaj. La literoj estas troveblaj helpe de la sekvantaj ŝlosilvortoj :

31 16 17 14 24 49 68 69 = sudfranclanda urbego.
35 34 25 19 6 40 23 = malantikva.
6 46 13 10 52 17 30 8 54 9 49 = dramo de Ibsen.
15 6 28 44 26 21 60 19 2 66 = esperantista ĉefurbestro.
51 18 37 38 39 44 27 = miloble mil.
4 5 43 42 11 8 1 24 20 65 = granda arĉmuzikilo.
56 55 59 50 57 7 45 9 = greka insulo marbatala.
33 3 61 58 47 67 53 11 = blanka nubamaso.
10 46 40 14 22 63 12 13 66 32 27 = usona ŝtato.
31 36 20 48 54 62 21 60 64 25 34 = filo de soldato.
16 29 54 41 8 39 = malgaja jarparto.

1 — 69 = sprita deklaro de la filmaktoro Danny Kaye pri la povo de la virinoj.

VORTPLEKTAJO

1 **PRENI**	8 **VENKI**	15 **BESTO**	22 **PALATO**
2 **MULATO**	9 **KORPO**	16 **ORELO**	23 **ELITO**
3 **LUNDO**	10 **AVINO**	17 **PRAVA**	24 **FILMO**
4 **OVALO**	11 **GLASO**	18 **PREMIO**	25 **KARATO**
5 **POETO**	12 **ALAŬDO**	19 **FORKO**	26 **ELEKTRO**
6 **ĈAMBRO**	13 **ACERO**	20 **AROMO**	27 **ĈARTO**
7 **MUZEO**	14 **LEPORO**	21 **MOSKO**	28 **KAROTO**

Ea la supraj vortoj elprenu unu literon tiel, ke la restintaj literoj, lasitaj en siaj antaŭaj lokoj, formu novan vorton. La elprenitaj 28 literoj en la numerita vico formos proverbon, kiu ofte estas aplikebla.

GRAMATIKO PER BONHUMORO

O-finaĵo

1/ O montras substantivon esprimantan **personon** (tajloro) **beston** (cikonio) **objekton** (ŝipo) **abstraktaĵon** (ĉagreno).

2/ O **substantivigas** ĉiujn aliajn radikojn : estas la **Simpla Derivado**

blanko (el adjektivo) **konstruo** (el verbo) **kialo** (el adverbo)

kontraŭo (el prepozicio) **veo** (el interjekcio).
RIM : nur **konjunkcioj NE** varias (kaj-se).



Necesas plej taŭge...

— Pardonu min, Sinjoro Doktoro ; Mia memoro estas tre malbona kaj mia hundo glutis la recepton. Pri tiu medikamento, ĉu mi devas ĝin preni ANTAŭ esti en mia lito, aŭ POST mia enlitiĝo ?



Antaŭzorgado

— Ŝia kanto estas tiel surdiga, la ruĝo de ŝiaj haroj tiel stranga, ke la soldatoj ne povis elteni tion ĉiuvespere. Jen la kialo de ilia okul-kaj-orel-kaŝanta kasko. Por ke ne estu « biso » donu al mi la tomatojn, kiujn (almenaŭ, mi tion esperas) vi ne forgesis !



Ne fuŝu elegantecon !

— Sinjoro Doktoro, ĉu, por la aŭskulto, formeto de mia ĉapelo estas neceso ?

Niaj perantoj

Aŭstrio : S-ro Johan Wieshofer, Wiener-Reichstrasse 2, LINZ (45 aŭstr. ŝil.).
Belgujo : S-ro Guyot Mateo, 18, rue Chefneux, BARCHON, Lg. (85 fr.).
Britujo : S-ro Frank Ashpole, 127, Midford Rd, Combe Down, BATH BA2 5Rx (15 ŝil.).
Ĉeĥoslovakio : S-ro Dezidero Koronczi, Nabrezie Metoda 1707/16, PRIEDVIDZA (2 us. dol).
Danlando : S-ro Ulrik Rasmussen, Norregardsvej 66, 2610, RODOVRE.
Finnlando : S-ro Joel Vilkki, SOMERO 9 - Pĉk. : Tu 60253 (9 mk.).
Germanujo Okc. : S-ro Joseph Bode, 35 - KASSEL-OBERZWEHREN, Hinter der Brücke 22, pĉk. Frankfurt (M) 234-759 (6,2 mk.).
Hispanujo : S-ino Jozefino Monter Palomar, Muntaner 416, 1°, la, BARCELONO (110 pes.).
Italujo : Itala Esperanto-Federacio, Via Po 7, TORINO (1.000 lir.).
Japanujo : S-ro Tara Nišiumi, 6-31-19 Kita-Koiwa Edogawa-Ku, 133, TOKIO - pĉ Tokio 44163 (640 jenoj).
Jugoslavio : Slovenia Esp. Ligo, Komenskega 7, LJUBJANA, poŝtfako 239 (1520 d.).
Nederlando : S-ro M. de Waard, Anemoonstraat, CAPELLE AAN DEN IJSSEL, ZH pĉk. 209721 (7 guld.).
Norvegujo : S-ino Marit Delor, Solveïen 143-B, LJAN.
Peruo : S-ino Skotte, Malecon Paul-Harris, 336, Dto 200 BARRANCO (Lima).
Pollando : Pola Esperanto-Asocio, Jasna 6, VARSOVIO.
Rumanio : S-ro Adrian Boldan, p.k. 1412, BUKUREŜTI - 6. (27 lei).
Sovetunio : S-ro Alik Melnikov, ab jaŝ 233 Rostov Don — 7.
Svedujo : S-ro Roland Dupuis, Helgagatan 36, uppg 13, STOCKHOLM Sö pĉk 157007 (10 kr.).
Svislando : S-ro Cl. Gacond, Miéville, 133 - 2314 LA SAGNE.
Tajlando : S-ro C.L. Unchitti, GPO box 1231, BANGKOK (2 us. dol.).
Usono : S-ro D.W. Hoffman, 1444 Leslie Street, HILLSIDE (N.J.) (2 dol.).
Aliaj landoj : Ni serĉas perantojn en aliaj landoj. Oni povas pagi la abonprezon per steloj (20 st.) aŭ respondkuponoj (12 respk.), per libroj aŭ per neuzitaj poŝtmarkoj. Sin turni al la Direktoro.



KASTELO GRÉSILLON

BAUGÉ
Maine-et-Loire
FRANCUJO

ESPERANTISTA KULTURDOMO

De junio ĝis septembro ĉiulandajn esperantistojn kaj eventuale iajn ajn karavanojn frue anonciatajn

Akceptas :

Por ripozi trankvile en atmosfero frateca ;
Por eklerni aŭ plulerni la internacian lingvon ;
Por ĝin praktiki per interŝanĝo de ideoj ;
Por aŭdi kulturajn prelegojn ;
Por studi specialajn problemojn ;
Por inter amikoj gaje libertempi ;
Por ekskursi tra centr-okcidenta Francujo.

VENU AL LA ESPERANTISTA KULTURDOMO

Kompleta Programo kun kondiĉoj havebla kontraŭ internacia respondkupono al :
ESPERANTISTA KULTURDOMO, Grésillon, BAUGÉ (Maine-et-Loire) Francujo

Sablé-sur-Sarthe. — Imprimerie Coconnier

Le Gérant : P. BABIN.

Supplément au nº 6 de 1971, de « KULTURAJ KAJEROJ »

LA VIE DE GRÉSILLON

ENTRE NOUS...

Lors de sa dernière réunion notre Conseil d'Administration a, selon le vœux émis à la réunion de fin juin, décidé de redonner vie à l'Association Culturelle du Château de Grésillon, créée il y a dix-huit ans. Plusieurs membres du Conseil d'Administration de cette Association étant présents, ils se sont réunis lorsque les travaux du Conseil d'Administration de la M.C.E. ont été clos. Les statuts de l'Association ont reçu quelques modifications mineures. L'Association et la M.C.E. travailleront évidemment en étroite collaboration et se complèteront harmonieusement. Le bureau qui doit fonctionner jusqu'à une prochaine Assemblée générale a été élu. Il se compose de :

Président : M. Bénistant
Secrétaire : M. Bodereau
Trésorier : M. Coussé

assistés de neuf membres, que le bureau peut éventuellement charger de tâches limitées. Etant régie par la loi du 1er juillet 1901, cette association pourra apporter à la M.C.E. une aide dans des domaines qu'interdisent à cette dernière ses statuts et le fait qu'elle est régie par la loi de 1917 sur les sociétés coopératives.

Le calendrier des stages de l'an prochain est établi. Il est très semblable à celui de l'an dernier. L'année 1972 étant celle du 20e anniversaire de la M.C.E. il a été décidé qu'à chaque stage une journée sera consacrée à la célébration de cet anniversaire. Les détails de cette célébration pourront changer selon les stages, mais à l'occasion de cette journée seront fêtés également tous les couples présents qui ont fait connaissance par l'esperanto. D'autre part, le deuxième stage sera consacré à une rétrospective de 20 années d'activité. Les principales organisations espérantistes internationales ont été invitées à venir exposer leurs expériences des vingt dernières années et à parler de leurs espoirs.

Lors de la première période aura lieu comme l'an dernier une rencontre des Cheminots espérantistes pendant une semaine, et nous espérons que pendant les deux semaines suivantes nous pourrons réunir quelques groupes d'enfants pour un premier essai de « Internacia Infan-renkontiĝo ».

D'ici l'été quelques travaux seront réalisés : aménagement de chambres et réfection d'un dortoir, fin des travaux d'évacuation des eaux usées. Nous ferons faire un devis de transformation d'une partie des communs en salle de conférences et de spectacles. Cet aménagement ne pourra se réaliser qu'avec votre aide à tous. Nous en reparlerons.

Nos programmes sont prêts. Demandez-les. Dès maintenant réservez vos places pour Pâques et l'été. Nous avons déjà des demandes.

LA REVUE

Merci à tous ceux qui ont déjà réglé leur abonnement 1972. Mais quelques uns n'ont pas encore envoyé celui de 1971. Ils nous aideraient beaucoup en réglant rapidement ou en nous faisant savoir s'ils ne désirent plus recevoir la revue. Cela nous éviterait des rappels inutiles et coûteux.

ABONNEMENTS BIENFAITEURS (suite)

M. Sujet (77)	15,00
C. Venon (18)	15,00
J.-P. Guillot (86)	15,00
R. Motto (30)	15,00
L. Belliard (44)	15,00
F. Lemagadure (56)	15,00
E. Moulin (95)	15,00
J. Pibarot (30)	15,00
R. Raynaud (30)	15,00
E. Noel (76)	15,00
R. Geneau (17)	15,00
C. Rouquet (78)	30,00
M. Thierry (75)	15,00
M. Serre (66)	20,00
J. Romero (Espagne)	15,00
R. Svoboda (Tchécosl.)	15,00
F. Baronnet (36)	15,00
P. Metivier (49)	15,00
H. Lavallée (76)	35,00
E. Marko (Hongrie)	15,00
G. Clopeau (92)	15,00
M. Bavay-Gillard (59)	15,00
M. Cuvelier-Delas. (59)	15,00
F. Cherault (78)	15,00
S. Cnudde (59)	15,00
P. Poly (75)	15,00
M. Suchareau (75)	15,00
C. Duflot (59)	15,00
R. Canet (89)	15,00
R. Rion (76)	15,00
M. Leclerc (80)	20,00
H. Genuit (10)	15,00
R. Pons (09)	15,00
G. Drezet (25)	30,00
Total	*570,00*

NOS PEINES

Tous ceux qui l'ont connue à Grésillon auront certainement de la peine d'apprendre que Madame Evelyne Benoiston est décédée en novembre. Avec elle, un peu de la vie de Grésillon est parti.

CONSEIL D'ADMINISTATION DU DIMANCHE 17 OCTOBRE 1971

La séance est ouverte à 10 heures sous la présidence de M. Babin. Sont présents : Mmes et MM. Babin, Benistant, Bodereau, Ciret, Coussé, Dairon, Guillot, Jelenc, Métivier, Micard.

Se sont fait excuser : Mmes et MM. Bénazet, Boyet, Chevalier, Cheverry, Guillaume, Jacquesson, Mathé, Thierry, Vazon.

EXAMEN DE L'ORDRE DU JOUR

Stages 1971 :

Pour la première fois, pendant l'année 1971, les recettes séjour ont dépassé les 100 000 F, contre 79 000 en 1970. Cela est dû au fait que plus de personnes ont participé aux stages, et pendant plus longtemps. La nouvelle répartition des stages semble avoir plu, puisque l'école d'été qui s'est déroulée du 3 au 24 juillet a réunie plus de 100 personnes. C'est lors du post-congrès de S.A.T. que le maximum a été atteint avec 132 personnes, dont certaines ont été logées en ville.

Côté dépenses, on note une augmentation de 10 % des prix de l'alimentation, ainsi que de 3 000 F pour les salaires.

Entre 1970 et 1971, les sommes consacrées aux investissements sont passées de 8 000 à 33 000 F. La transformation de la cuisine (en partie payée sur l'exercice 1971), la réfection de la chambre 5, l'achat d'une nouvelle chambre froide, la réfection du système d'évacuation des eaux usées... justifient ces sommes.

PROGRAMME 1972

Noël 1971 :

Une demande a été présentée pour un stage du 27 décembre au 2 janvier. Le principe est accepté aux conditions suivantes : 25 personnes minimum pendant 7 jours, paiement avant le 10 décembre. Administration M. et Mme Babin.

Pâques 1972 :

Du 26 mars au 1er avril : Cours, conversation, conférences. Administration M. et Mme Jelenc.

Du 3 au 9 avril : Semaine culturelle d'U.F.E. Administration M. et Mme Bodereau.

Entre le 10 et le 30 avril, Amikeco-Kongreso de M. Delaire.

Eté 1972 :

Du 2 au 23 juillet : semaines culturelles, cours activités diverses. Administration M. et Mme Babin.

Du 23 juillet au 6 août : semaines internationales. Administration M. et Mme Guillot.

Du 6 au 27 août : semaines culturelles, cours, activités diverses. Administration : M. et Mme Dairon ont été préssentis.

Du 27 août au 13 septembre : cours, conversation. Administration M. et Mme Ciret.

Au cours de l'été 1972, diverses manifestations sont prévues pour célébrer le vingtième anniversaire de Grésillon. Lors de la quinzaine internationale aura notamment lieu un symposium sur : 20 ans d'activités espérantistes.

Prix des séjours :

Compte tenu de l'augmentation des prix, les tarifs de séjours sont fixés comme suit :

	plus de 3 jours	moins de 3 jours
Chambre particulière	27	31
Chambre familiale	24	28
Box	22	27
Dortoir	20	24
Campeur	18	18
enfants 3 à 6 ans	12	15
enfants 1 à 3 ans	4,50	6,50
enfants jusqu'à 1 an	gratuit	

Divers travaux sont prévus : finir la réfection du système d'évacuation des eaux usées, refaire la chambre 23, transformer le 24 en deux chambres particulières, remettre en état les douches du 1er étage.

Il a été décidé de placer à la caisse d'épargne l'argent actuellement déposé à la BNP.

Le conseil d'administration accepte la démission de M. Coussé du poste de trésorier de la M.C.E. M. Coussé continuera d'exercer ses fonctions jusqu'à l'assemblée générale du mois de mars 1972.

L'ordre du jour étant épuisé, la séance est levée à 16 h. 30.

PAQUES

Programme 1972

Grésillon a 20 ans

PREMIERE SEMAINE :

Arrivée le 26 mars — Départ le 2 avril

Semaine d'étude

Cours - Conversation - Conférences

DEUXIEME SEMAINE :

Arrivée le 3 avril — Départ le 9 avril

IIe Semaine Culturelle

organisée par JEFO sous l'égide de UFE

Programme très varié organisé par les jeunes.

Cours - Causeries - Distractions

ÉTÉ

Première période

Arrivée le 2 juillet — Départ le 23 juillet

Semaines Culturelles et Esperantistes

avec rencontre internationale d'enfants

et semaine des Cheminots (2-9 juillet)

Cours pour débutants - Cours pratique et supérieur - Reliure - Vannerie - Emaux

Deuxième période

Arrivée le 23 juillet — Départ le 6 août

Quinzaine Internationale

Pour le 20e anniversaire de Grésillon les principales associations espérantistes internationales font le point de leur activité pendant les vingt dernières années.

Troisième période

Arrivée le 6 août — Départ le 27 août

Semaines d'étude

Cours pour débutants, cours pratique, cours supérieur, préparation aux différents examens

Activités annexes (reliure, etc...)

Quatrième période

Arrivée le 27 août — Départ le 10 septembre

Culture et Détente

Cours - Conversations - Distractions

A chaque période, une journée sera consacrée à la célébration du 20e anniversaire de la M.C.E.

Les couples ayant fait connaissance par l'Esperanto sont particulièrement invités à y participer.

Retenez vos chambres à l'avance.

Renseignements et adhésion :

Maison Culturelle Espérantiste

Château de Grésillon, 49 - Baugé

VOUS POUVEZ COMMANDER

Vos livres d'étude

Vos dictionnaires

Vos livres de littérature, poésie, théâtre, histoire, géographie, sciences, à notre Service Librairie.

Adresser commandes et chèques de paiement à :

MAISON CULTURELLE ESPERANTISTE
49 - Baugé
C.C.P. Nantes 1485-39

Prix franco au-dessus de **5 Fr.**

Demandez notre catalogue.

NOUS TENONS EGALEMENT A VOTRE DISPOSITION :

Cartes postales de Grésillon : noires :	0,40 F.
couleur :	0,50 F.
Cuillères de collection : 9,00 et	12,00 F.
Pendentifs :	7,00 F.
Disques de stationnement :	3,00 F.
Etoiles pour vitres de voitures :	1,00 F.
Disque 30 cm avec chansons de Bob Dylan interprétées par le Duo Espera :	28,00 F.

et :

Les Héros Existentialistes

(texte français-esperanto)

de Colette Llech-Walter : 3,00 F.

(plus frais d'envoi pour commande au-dessous de 5,00 F.).

POUR VOS COURS DE PERFECTIONNEMENT

Le livre qu'il vous faut :

POR LA PRAKTIKANTOJ
de **P. Babin**
Prix : **8,50 F.**

NOS COURS
PAR CORRESPONDANCE

Cours 1er degré. — 16 livrets illustrés qui permettent d'acquérir les bases essentielles de la langue. Cours et corrections : 50,00 F.

Cours 2e degré. — 14 leçons présentées sous forme de feuillets. Permet d'acquérir une connaissance pratique de la langue. Cours et corrections : 50,00 F.

Cours 3e degré. — Excellent entraînement à un cours supérieur : versions, thèmes, étude de textes. Cours et corrections : 30,00 F. Nous pouvons fournir les livres de cours à ceux qui ne les possèdent pas déjà.